EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

**Enhavo**

- Ĉinio revenas al la AMO-familio
- AMO 71 – ĉin-provinca pripeso
- Duncan Charters rekonas la gravecon
- So Jinsu donas elazian saluton

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-58 sendita el Budapeŝto, la 19an de decembro*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) okazigis Seminarion de Ĝeneralaj Sekretarioj

Por festi la Zamenhofan Tagon, la 14-an de decembro, okazis Seminario de Ĝeneralaj Sekretarioj, kiu estis organizita de ĈEL per la apo *VooV Meeting*. La aranĝo rolis samtempe kiel La temo de la 71a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). La temo estas "En 2021 kiel kreive antaŭenpuŝi Esperanto-movadon". Partoprenis en AMO-71 preskaŭ 90 esperantistoj, krom ĉinoj, ĉeestis ankaŭ koreaj samideanoj.

S-ro Yu Tao, vicprezidanto de Ĉina Internacia Eldona Grupo kaj vicprezidanto de ĈEL, gratulis al la seminario videe. Li diris, ke antaŭnelonge la ĉina registaro diskutis pri praktikado de la "Dekkvara Kvin-jara Plano", en kiu kreivo kaj disvolvo ludos tre gravan rolon, Ĉinio pli kaj pli malfermiĝos. En tiu situacio, kiel disvolvi Esperanton estas tre pripensinda kaj diskutinda temo. Li esperis, ke per la komuna diskutado kaj cerbumo oni povos esplori novan vojon por disvolvi kaj progresigi la Esperanto-movadon. "Ĉi-jare estas la 40-jara datreveno de aliĝo de la Ĉina Esperanto-Ligo al UEA, en la tre memorinda jaro la okazo de la nuna seminario sendube profundigas la rilatojn inter la du asocioj.

Duncan Charters, prezidanto de UEA kaj So Jinsu, estrarano de UEA ĉeestis en la seminario kaj faris parolon.[…]. La seminario estis gvidata de s-ino Chen Ji, direktoro de la Oficejo de ĈEL. 13 prelegintoj donis siajn kontribuojn. Ili venas de lokaj asocioj,

kaj du komisionoj de ĈEL (junulara kaj ekonomia). Kiel organizantoj de Esperanto-asocioj, ili donis pensojn kaj ideojn surbaze de siaj spertoj. La prelegoj temas pri diversaj kampoj, ekzemple universitata kurso, interreta informado, komerca agado, aktivigo de junuloj kaj tiel plu.




Komuna bildo de la pionira AMO-seminario numero 4, okazigita tra pluraj semajnoj de aŭgusto 2014. Simila bildo por la nuna seminario ne estus same kontentiga; ne sufiĉus eĉ ŝakktabulo, por ke ĉiu partopreninto ricevu sian ĈELan ĉelon.

## Salutmesaĝo de prezidanto de UEA en AMO 71
## Duncan Charters

Mi havas sufiĉe longan historion en la Esperanto-movado; mi memoras ke Dr. Ivo Lapenna, kiam li estis ĝenerala sekretario kaj poste prezidanto de UEA, kredis sincere, ke se ni ne atingos la respekton de la kleruloj, ni malmulton povos atingi por Esperanto en la mondo.

Sed alia flanko estas tio, ke ni devas eduki la publikon por kompreni kial Esperanto gravas por la mondo, kaj por ili persone. Ju pli ni sukcesos konsciigi landon pri tio, ke Esperanto estas unika instrumento por faciligi la interpopolan komprenon, des pli oni povos kompreni kaj akcepti, ke ni havas belan donacon al la mondo. Ni devas kunlabori por trovi kiel vidigi tiun donacon. La homoj povos efektive akcepti, ke Esperanto estas unu el la plej gravaj iloj por la pacigo

de la mondo kaj interkomprenigo de la mondo. Ni havas tiel unikan instrumenton kiu faciligas egalecan komunikadon kiu ne baziĝas sur unu sola kulturo, unu sola politika reĝimo, unu sola maniero vidi la mondon.



La prezidanto de UEA, d-ro Duncan Charters, flankita de la du vic-prezidantoj de UEA, Fernando Maia, Jr. el Brazilo, kaj Huang Yinbao el Ĉinio. Fotita en Lahti en 2019, ilia elektojaro.

Mi deziras al vi sukceson en via laboro. Mi klopodos resti kun vi, ĉar mi tre interesiĝas aŭdi viajn perspektivojn pri tiu laboro. Ofte oni akuzas Esperanton esti tro eŭropcentra, okcidentcentra, sed ĝi ne estas nur por Eŭropo aŭ Okcidento, ĝi validas same por ĉiuj popoloj de la mondo. Sed ni devas pli aŭskulti al vi por pli edukiĝi pri aliaj perspektivoj kiuj helpos la laboron de ĉiuj. Do mi ege antaŭĝuas ĉi tiun duan AMO-seminarion inter ĉinoj. […] Grandan dankon pro la honoro ke mi faru la mallongan salutparolon.

## Salutmesaĝo de la estrarano de UEA So Ĵinsu

Karaj gvidantoj kaj seminarianoj de la AMO 71,

En la nomo de Universala Esperanto-Asocio, la AMO-programisto, mi, SO Jinsu el Koreio, estrarano de UEA pri Azio kaj Oceanio, salutas vin ĉiujn! Mi esprimas specialajn dankojn al Ĉina Esperanto-Ligo kaj s-ino Chen Ji. Samtempe UEA ĉiam dankas nian karan respondeculon de AMO, s-ron Stefan MacGill, kaj ILEI, kiuj multe helpas kaj kunlabore tre bone aranĝas la seminariojn. AMO, mallongigo de “Aktivula Maturigo” estas la strategia plano de UEA, kaj celas altigi la konojn kaj kapablojn de la aktivuloj tra la mondo.



Ekde marto de 2014, AMO-seminario diversforme plenumiĝas kun ŝanĝo de la urboj, de lando al lando, kaj de kontinento al kontinento. Mi nun persone tre ĝojas sperti pli oftan partoprenon en la kvalita kaj enhavoriĉa AMO-seminario pro du kialoj, nome ĝia okazo en aziaj landoj kaj virtualigo.

La temo, "En 2021 kiel kreive antaŭenpuŝi Esperanto-movadon" estas grava. Ni devos pensadi tion ne nur en la jaro 2021, sed ankaŭ ĉiujn jaroj de la nova jardeko. Hodiaŭ 14 ĉinaj kolegoj gvidos la seminarion, de s-ro Wang Minhao ĝis s-ro Wang Letian: de Wang ĝis Wang. Por ĉiuj mi dankas pro iliaj preparoj kaj kontribuoj. Kaj teknike la aplikaĵoj *Tencent Meeting* kaj ĝia internacia versio *Voov Meeting* estas ĉefaj, kaj ankaŭ alia aplikaĵo *Zoom*; zomo estas preta por partoprenantoj ekster Ĉinio, kvankam ĝi servas kun limigita kondiĉo de nur spektado.

Karaj samideanoj, estu sanaj, kaj ni seminariu ankaŭ fizike kaj ĉeeste tuj baldaŭ.

 

Aliaj vizaĝoj el Azio: Universitato Azim Premji en Bengaluru, Barato; junaj ekskursantoj en Indonezio. Fotoj: SMG

========== vortoj: 760 ==========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.